

## **Pli pri praa agrikulturo kaj nunaj agrikulturaj bezonoj**

En Américas-magazino (aŭgusto 2011) oni informas pri “camellones” en la Beni-a Valo de **Bolivio**.

“Camellones” [ka-me-jo-nes] estis kaj estas altegitaj terenetoj inter kanaloj. La kombinaĵo de camellones kaj kanaloj estas ege utila por dreni terenon post la alveno de pluvo kaj glacirivera akvo, por ke ekzistu taŭgaj terenetoj por la konstruado de domoj kaj por agrikulturo.

La indiĝenaj bienistoj kiuj partoprenas projekton por rekonstrui la kanalojn kaj la “camellones” havas pli da rikoltoj dum la jaro kaj kaptas fiŝojn kiuj eniras la kanalojn. Krom havi tiujn avantaĝojn, bieniestroj nun uzas la ligitajn kanalojn dum inundoj kiel ŝoseojn por porti siajn varojn al vendolokoj.

**Komentoj:**

Andrea Marcos, itala sociologo kaj analizisto pri manĝaĵ-sekureco, kiu vizitis la Beni-an Valon kiel reprezentanto de UNO: “La praavoj estis brilmensaj, kaj samaj estas la homoj kiuj hodiaŭ adoptas la sistemon. Jen ni havas memdaŭrigan sistemon kiu kaptas atmosferan karbonon, metas ĝin en la teron, kaj ankaŭ kaptas nutrenzojn el la akvo.

Per la camellones, oni ŝanĝis tragedion en eblon por sukceso. Mi kredas ke ni povas vidi ĉi tion kvazaŭ la estontecon. Ĝi estas tre dinamika maniero por konservadi agrikulturan sistemon kiu povas estiĝi grava rimedo por la tuta homaro, ne nur por la enloĝantaro de ĉi tiu departamento aŭ de la amazona regiono.”

Herminia Guaji, kanal-prizorgantino: “Ni estas tre dankemaj al niaj praavoj kiuj elpensis ĉion ĉi. Iliaj posteuloj ankoraŭ manĝas pro la saĝeco de la praavoj.”

Pli pri Camellones en vikipedio (en, es, pt, qu) <http://es.wikipedia.org/wiki/Camellones>  
(en la indighena lingvo) [http://qu.wikipedia.org/wiki/Waru\\_waru](http://qu.wikipedia.org/wiki/Waru_waru)

Foto tie en la regiono de la Titikaka-Lago (Bolivio & Peruo)

(sendita de Herman Deceunink, 2012-11 - amendita de AVE)